
# starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio - Orgán Českého esperantského svazu

Jaro tria N-ro 2 Marto-Aprilo 1970

## DUDEK KVIN JAROJ DE SOCIALISMA ĈEĤOSLOVAKIO

En la historio de la homaro dudek kvin jaroj estas neglektinda tempospaco. En la vivo de nacio ĝi signifas tutan epokon.

Kun la lasta kvaronjarcento estas ligita ekzisto de postmilita Ĉeĥoslovaka respubliko, kiu, post la liberiĝo helpe de Soveta armeo, la 9an de majo 1945, konstituiĝis kiel popoldemokratia ŝtato de la du frataj popoloj - ĉeĥa kaj slovaka.

Dum la sekvantaj jaroj Ĉeĥoslovakio transiris al socialisma socia ordo kaj akiris novan ekonomian aspekton kiel alte evoluiĝinta industria lando. La nova sociordo ebligis al ĝiaj civitanoj plene ekposedi akiraĵojn de la scienco, tekniko kaj kulturo.

---

Por la adeptoj de la internacia lingvo en Ĉeĥoslovakio la 25-a datreveno estas i.a. okazo por konatigi al eksterlandaj samideanoj tiujn ĉi faktojn kaj krome ankaŭ hodiaŭajn problemojn de sia patrujo.

La ĉeĥoslovaka esperantistaro okazigos en tiu ĉi jaro kelkajn konferencojn kaj internaciajn renkontiĝojn. Aparte gravaj estos tiuj en Brno kaj Přerov omaĝe al la jubileo de Jan Amos Komenský-Comenius, pioniro de la internacia lingvo, de kies morto pasos 300 jaroj kaj kiun rememoros la tuta mondo enkadre de la Jaro de edukado proklamita de UNESCO. Alia evento estos la Dua Kultura Festivalo en Opava memore al L. van Beethoven.

Per similaj aktivecoj, diversmaniere profitante la internacian lingvon, ĉeĥoslovakaj esperantistoj kontribuos al diskonigo de sia lando en ĝia jubilea jaro kaj samtempe stimulos ankaŭ kreskon de la movado.

Oldřich Knichal

---

Sur la foto : Brno, la urbo, kiu fine de julio gastigos partoprenantojn de la Dua Komuna Kongreso de IKUE - KELI

## III-a PLENKUNSIDO DE CK ĈEA

okazis la 14-15an de marto en Praha. Raporton pri la agado de post la lasta plenkunsido en oktobro 1969 prezentis la prezidanto de ĈEA, Josef Vítek. S-ano Pavel Rosa, prezidanto de AESSR informis pri la antaŭkongreso de la 55-a UK en Bratislava.

Oni akceptis abdikon de la komitatanoj Z.Hršel, O.Hrubý, L.Krajíc, L. Rýznar kaj komisiis vickomitatanojn T.Balda, O.Knichal, Z.Rybáčková kaj F.Wohlmuth plenumi funkcion de la komitatanoj. Anstataŭ s-ano Hršel, kiu eksiĝis de la estraro de ĈEA, estis elektita s-anino D.Zdvihalová.

La plenkunsido prijuĝis la pluan eldonadon de la asocia organo Starto, kiu jam ekde 1970 aperados ofsetpresita. Estis rekomendite uzi unuopajn numerojn propagandcele, t.e. ebligi al ER ilian aĉeton.

CK ĈEA aprobis per voĉdonado laboplanon de ĈEA por 1970. La lokaj EK ricevos kompletan ekzempleron de la plano.

Oni konstatis, ke la membreco de ĈEA en UEA ĝis nun ne realiĝis, ĉar ne estis solvita transpago de la membrokotizoj. Por aliĝo estis aprobita kvanto de 1100 anoj.

Rilate partoprenon en Nacia fronto de ČSR, ĈEA estos verŝajne nur registrita en tiu ĉi organizaĵo. Plua traktado ankoraŭ sekvos.

La plenkunsido aprobis preparatan fondon de la sekcio de nevidantaj esperantistoj kaj fiksis tiurilate membrokotizon por ĈEA 10 Kčs. Aprobita estis konsisto de la lingva (prez.J.Vondroušek) kaj ekzamena (prez.Ing. Krajíc) komisionoj. Aliĝo al ILEI de Pedagogia sekcio dependas de la membreco de ĈEA en UEA.

Venonta kunsido de CK ĈEA okazos la 5-an de julio en Opava.

### Medalo al Kalocsay

La hungara PEN-Klubo, internacia organizaĵo verkista, transdonis ĉi jare sian honor-medalon al la hungara Esperanto poeto kaj tradukisto Kálmán Kalocsay, agnoskante la kontribuon, kiun li faris per siaj majstraj tradukoj el mondliteraturo al la internacia lingvo.

### Senkoste al Vieno

Laŭ decido de la IKK oni invitas po unu infano (6-13jara) el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo kaj Pollando - por senkosta partopreno en la 11-a Internacia Infankongreseto en Vieno.

Statistiko por la 55-a nombras 1120 aliĝintojn el 38 landoj (ĝis 11.3.70).

## PO DEVATENÁCTÉ DO LANČOVA

Jako každoročně i letos očekává Stříbrná zátoka na Vranovské přehradě své hosty - zájemce o mezinárodní jazyk. Devatenáctý SET Lančov proběhne v těchto etapách :

① 12.7 - 25.7 ② 26.7 - 8.8

Vyučování jako obvykle ve skupinách A (začátečníci), B (pokročilí), C (konversační kurs), D (pro kandidáty učitelství).

V programu každé etapy je několik výletů do okolí. Po celý měsíc budou přítomni i zahraniční esperantisté.

14denní pobyt stojí pro přihlášené do konce dubna 350 Kčs (pro mládež do 15 let 320). Po tomto datu 380 Kčs, pro mládež 350.- Přihláška je platná až složení zálohy (nejméně 150 Kčs.)

Ubytování ve stanech po dvou osobách a v prosté chatě. Kuchyně obslouží táborníky pětkrát denně.

Přihlášky zašle KE v Třebíči, p.schr.72

### Seminář pro mládežnické funkcionáře

Esperantská mládež v Třebíči uspořádá v Lančově ve dnech 1.-11.července seminář pro funkcionáře esp.mládeže. Každý klub či kroužek může vyslat nejvýše dva zástupce. Cena pobytu: pro nevýdělečně činné Kčs 150, pro ostatní 200.-

## ZE ŽIVOTA KROUŽKŮ

Brno Na výroční schůzi Klubu esperantistů v Brně byl zvolen předsedou ing. Jan Werner. Místopředsedou je dr. ing. Jaromír Šikula CSc, jednatelem Zdeněk Hršel. Dosavadní předseda, Josef Vondroušek, se vzdal funkce, aby se mohl plně věnovat informační a novinářské službě. Výroční schůze ocenila jeho zásluhy o klub a zvolila J. Vondrouška čestným předsedou klubu. Čestnými členy byli dále zvoleni Marie Adamcová, Tomáš Borkovec, Rudolf Nečas, Ota Petr a Vilibald Scheiber.

Ostrava Členská základna EK při DK VŽKG potěšitelně vzrostla - v únoru dosáhla čísla 75 ! Ve stejný měsíc se ve Společenském domě VŽKG rozběhly nové kursy esperanta pro začátečníky s 25 přihlášenými, které vede D. Kočvara a ing. K. Janouš. Konverzační kurs vede s. Kyselý. Přes třicet členů kroužku se předběžně přihlásilo na letošní světový kongres .

Praha Na členské schůzi 23. března byl zvolen nový 10členný výbor, opět v čele s prof. dr. R. Horským, místopředsedy A. Slaninou a A. Bartošíkem, jednatelem arch. J. Drlíkem a pokladníkem A. Bárochovou.

Ladislav Krajíc sesdekkvinjara. Naskiĝis la 14an de aprilo 1905 en Černovice apud Tábor (Suda Bohemio). Esperantisto de 1919. Prelegadis en E-elsendado de radiostacio Moravská Ostrava kaj prezidis tie la tutŝtatan kongreson de EA ČSR, kies estrarano li estis. Aŭtoro de lernolibreto "Simpla Esperanto." Tradukis en la ĉeĥan "Teknika vortaro" de Wüster k.a. Lastatempe vickomitatano de ĈEA kaj prezidanto de ties ekzamena komisiono.

## ORA DATREVENO DE "AŬRORO"

Esperanta blindulrevuo "Aŭroro" aperanta en Praha festas ĉi jare sian kvindekjariĝon. Ĝia redaktoro, s-ano Vuk Echtner, diris al ni tiuokaze kelkajn vortojn :

"La novorganizo de la ĉs. blindulmovado post la dua mondmilito kaŭzis, ke la celata koncentriĝo de organoj kaj organizaĵoj frape trafis ankaŭ la Esperanto-parton." Aŭroro" fariĝis, kiel ĉiuj similaj fakaj organoj, "suplemento" al "Zora", la nacilingva centra organo de ĉs. blinduloj. La tendenco kaj enhavo de "Aŭroro" per tio ne ŝanĝiĝis, male ĝia daŭra vivo estis garantiita, ĝia amplekso fariĝis 40 paĝoj en unu numero kaj ĝi iĝis dumonata, kiam la nombro de numeroj pliiĝis de kvar al ses pojare. Ĝi estas la plej malnova gazeto siaspeca en Ĉeĥoslovakio. Ni distribuas ĝin al tridek o da landoj...

Koncerne "Zora" mem, sub la lerta kaj inteligenta gvidado de d-ro Z. Šarbach (neesperantisto), jam dum pluraj jaroj ĝi denove partoprenas la diskonigadon de la Esperanto-movado per regula monata rubriko "Z esperantského světa" kaj per aliaj artikoloj.

Nun oni priparolas la eldonon de literaturaĵo ĉeĥa en Esperanto, kiel jubilean donacon al la legantoj de "Aŭroro."

SEKCE ESPERANTA PŘI S Č F. Snaha po účinné propagaci esperanta prostřednictvím poštovních známek, razítek a obálek vedla k založení "Sekce E" - skupiny sběratelů - při námětové komisi Svazu českých filatelistů v říjnu loňského roku pod vedením V. Hasaly (Hodonín, S. K. Neumanna 37).

Dosud vydala tři ZPRAVODAJE, pro své členy zdarma. Zájemci jsou v nich seznamováni se všemi známkami, razítky ap., rovněž s adresami členů sekce, jejichž počet vzrostl z původních deseti na čtyřicet.

Josef Šolc

## FERIOJ EKSTERLANDE

### Infanoj sub tendo

Hungara Esperanto - Asocio,ĵa TeritoriaKomitato en Pécs 1, pf. 2 aranĝas ankaŭ ĉijare dektagan tendumadon en Harkány(26.6 - 6.7)por infanoj en la aĝo 10-15 jaroj.

### Kursoj en Godeĉ

En la fino de julio kaj komence de aŭgusto okazos korespondaj kursoj por instruistoj de Esperanto (15-20-tagaj) en la pitoreska montara urbo Godeĉ nordokcidente de Sofio.Ĉeesti povas ankaŭ alilandanoj eĉ ne por la tuta periodo. Informojn donos la kursgvidanto S.Hesapĉiev,Tintjava 6,bl.27,Sofia 13.

### Volparija pli malfrue

La pasintjare fondita Internacia Esperanta Ferio-Centro en Volparija komencos la sezonon nur la 1-an de julio.La prokrasto okazis pro la akcepto de 150 infanoj - lernantoj el Banja Luka kies lernejo estis grave damaĝita dum la katastrofa tertremo tie okazinta.La prezoj por IEFC estas 3,60 US $ po persono por kompleta pensiono en du-aŭ trilitaj ĉambroj. Infanoj ĝuos 30% resp. 50% rabaton.

---

Helpilo por kursgvidantoj kaj D-kursoj estas libreto de D.Koronczy (Nábr.Metoda 1707/16, - Prievidza,SSR).Ĝi enhavas konversacion,literaturon de E.ks.Prezo 7Kčs

## PRACOVNÍ PLÁN NA ROK 1970

Ústřední výbor Českého esperantského svazu schválil na svém zasedání v březnu t.r. Pracovní plán ČES,z něhož vyjímáme nejdůležitější části :

I. Činnost ČES a čs.esperantského hnutí má být zaměřena zejména na
- organizační a ideové upevnění svazu,jeho sekcí a místních skupin,
- rozšíření a zkvalitnění výuky esperanta a jeho důstojnou popularizaci na veřejnosti,
- morálně politickou výchovu esperantistů

Je třeba se soustředit především na rozšíření členské základny svazu nejméně na 2 000 členů,zlepšit vydávání svazového orgánu a zajistit kontinuitu časopisu Paco,dořešit otázku zapojení svazu do ČNF a UEA,získat místnosti pro ústředí ČES a konsolidovat činnost jeho sekcí.

Nutno všemožně zajišťovat vydávání učebních a propagačních pomůcek,spolupracovat dále s masovými sdělovacími prostředky a rozšiřovat vzájemné styky s národními i mezinárodními esperantskými organizacemi.

Využívat esperanta k pravdivému informování zahraničních organizací,časopisů,přátel ap. se životem naší země.Úzce spolupracovat s esperantskými organizacemi socialistických zemí a zájmovými organizacemi doma.

II. Plán ediční činnosti ČES

Vydávat svazový orgán Starto ve zlepšené úpravě,6krát za rok, v rozsahu 8-12 stran a v nákladu 2000 výtisků.

V denním tisku i jinde publikovat zprávy, informace a články z našeho i mezinárodního hnutí.

Knižní a sešitové publikace,které vyjdou v roce 1970 :

APOKRYFY K.Čapka v překladu J.Vondrouška, SLEZSKÉ PÍSNĚ P.Bezruče v překl.T.Pumpra, J.Kořínka a R.Hromady (vyd.EK Ostroj,Opava) , ZKUŠEBNÍ ŘÁD pro zkoušky z esperanta Th.Kiliana (2000 výt.,vyd.ČES), LETÁK informační Z. Hršela a spol. (20 000 výt.,vyd.ČES,cena 0,20 Kčs), POHLEDNICE s mapkou ČSSR (3000 výt.,cena 2 Kčs).

III. Hlavní akce roku (chronologicky)

1. Kulturní festival Opava (3.-6.7)
2. Desáté jubilejní setkání v Poděbradech (4.-12.7)

3. Letní esperantský tábor v Lančově (12.7 - 8.8)
4. Letní esp.kursy, Česká Třebová-Hory (11.-22.7)
5. Druhý kongres IKUE a KELI v Brně(24-31.7)
6. Seminář k výročí J.A.Komenského,Přerov (25-30.7)
7. Předkongresové dny UK 1970,Bratislava (29-31.7)

## HUNGARAJ ESPERANTISTOJ KONGRESIS - 21.-22.3 1970 en Budapeŝto -

La unuan tagon okazis solena plenkunsido omaĝe al la 25-a jubileo de liberigo de Hungario (4.4.1945),ligita kun altnivela arta programo.

La dua tago estis dediĉita al laborajkunveno de HEA - delegitaro.En la raportoj de la estraro kaj en vigla diskutado oni valortaksis notindajn sukcesojn de la movado ĉefe en la lingvo-instruado kaj valoraj soci-kulturaj aranĝoj. Aŭdiĝis ankaŭ multaj kritikaj vortoj kaj estis lanĉitaj novaj konkretaj taskoj.

La kongreson partoprenis kiel gastoj de HEA la reprezentantoj de Esperanto-Asocioj el BPR,GDR,USSR kaj ČSR (Krajíc, Sviták),kiuj salutis la kongreson kaj gratulis al la hungaraj samideanoj okaze de la 25-a liberig-jubileo.Miaj delegitoj invitis samtempe la ceterajn reprezentantojn de E-Asocioj al simila reciproka vizito de la II.-a Esperantista Kultura Festivalo en Opava.

La kongreso estis bone organizita.Ni kore dankas al niaj hungaraj kamaradoj por ilia tre gastama akcepto kaj deziras al HEA multajn novajn sukcesojn.

F.Sviták

## Unika radioamatora konkurso en Brazilo

Meze de majo la brazila ministerio de komunikado okazigos por la unua fojo en la mondo Internacian Radioamatoran Konkurson utiligante la lingvojn anglan,francan,hispanan - kaj ESPERANTON !

Por ke la ministerio pli konvinkiĝu pri la tutmonda valideco de la IL,oni dezirus ke,almenaŭ dum tiu ĉi jaro,ĝi ricevu kelkajn ekzemplerojn de revuoj,bultenoj,libroj,prospektoj ks. en aŭ pri Esperanto.Por tio necesas utiligi jenan adreson : Gen.Div.Kleber Rollin Pinheiro (R-1),Direktor Geral de DENTEL,Ministerio das Comunicaçoes,Rua Miguel Couto,105,21º andar,Rio de Janeiro,Gb,ZC 21,Brazilo.

## FARIĜU MEMBROJ DE IPTEA !

Ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj-laborantoj de poŝto,telegrafo,telefono,radio aŭ televido,membriĝi al Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA). Membrokotizo 15 Kčs inkluzivas jarabonon por fakgazeto "Interligilo" eldonata en Sofio.Indiku vian profesion,eventuale viajn sugestojn kaj proponojn. La monon sendu perpoŝte al la peranto :

Marie R a c k o v á,
Kyjevská 15, P l z e ň

## FLORBEDO DE ESPERO

En la medicina fakultato de la Yamaguĉi universitato (Japanujo) oni jam kelkajn jarojn kulturas kaj kreskigas semojn senditajn de samideanoj el la tuta mondo.La plantoj tiel vekas intereson pri Esperanto inter studentoj kaj profesoroj.

S-ano H.Ogata (UEE,Yamaguĉi-ken) en sia letero sin turnas al ĉiuj kun peto sendi bonvole semojn de florherboj kaj florarboj.

Ota G i n z,malnova membro de EK en Praha,dankas al la multnombraj amikoj, kiuj rememoris lin per siaj leteroj,salutoj,proponoj por diversaj interŝanĝoj ktp.Ili bonvolu akcepti lian pardonpeton kaj klarigon,ke liaj fortoj neniel sufiĉas por respondo kaj plenumo de ĉiuj diversaj deziroj kaj eĉ ne por nura ĝentila danko. Li estos feliĉa revidi ilin en junio aŭ julio dum iu el kunvenoj de lia amata EK en Praha.

# Diversaĵoj

En la ĉi-jara Somera Esperanto-Universitato de Gyula (5-11 julio 1970) prelegos i.a. Reto Rossetti, István Szerdahelyi kaj prof. Ivo Lapenna. ● "EL POPOLA ĈINIO" anoncas,ke baldaŭ aperos en Esperanta traduko la unua volumo de "Elektitaj verkoj" de Maŭ Zedong". ● Parto A-Ĉ de la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estos verŝajne finpretigita dum la unua duonjaro de 1970. ● Laŭ la statistiko de CED la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en la Internacia Lingvo en 1969 estis 4 133 kompare kun 2 416 en 1968 kaj 2 014 en 1967.

---

## Závazek k výročí osvobození

Výbor EK při PKO v Olomouci přijal na počest 25.výročí vítězství nad nepřítelem esperantského hnutí, nacistickým Německem, závazek zaměřit všechno své úsilí k tomu,aby v průběhu letošního jubilejního roku alespoň zdvojnásobil počet těch,kteří se již v kroužku přihlásili za členy ČES

## Mendeblaj eldonaĵoj

Junulara kantareto de J.Cink...5K čs
Invito al ČSSR .............. 13 "
(por 10 ekz.kaj pli 10%-a rabato)
Co nevíte o esperantu O.Knichala 4"
(za 20 a více ekz. sleva 20%)
(mendebla ĉe ČEA)

Sarafov : Legolibro ............10.-
R.Kritz : Freŝa mateno,romano, trad. O.Ginz...................25.-
Leterpapero kun kovertoj(10).....5.-
(havebla ĉe EK Praha)

Daŭrigo sur la 7-a paĝo

## Za kolik do Vídně ?

V nejbližších dnech očekáváme přesnou kalkulaci zájezdu do V í d n ě. Upozorňujeme všechny přihlášené i případně další zájemce, že tento zájezd pořádá cest. kanc. Tatratour. Neposílejte proto žádné peníze za zájezd na naše bankovní konto!

---

Pořadí EK podle počtu řádně přihlášených členů, kteří mají zaplaceny členské příspěvky na r. 1970 (zpracováno k 8. 4. 1970): Praha - 131, Mělník-65, Ostrava VŽKG - 61, Vsetín -53, Č. Budějovice - 35, Pardubice - 27, Třinec 26, Plzeň - 24, Písek - 22, Olomouc - 20, Hranice - 19, Tábor - 19, Poruba 17, Litoměřice - 16, Kopřivnice - 15, Poděbrady 15, Havířov - 14, Brno I.B 12, Kolín - 12, Kyjov - 12, Bor - 11, Most - 11, Příbram - 11, Frýdek-Místek - 10, Příbor - 10, Hodonín - 8, Skuteč - 7, Havl. Brod - 6, Nový Jičín 6, Šumperk - 6, Bruntál - 5, Frýdlant n/Ostr. - 5. Celkem 776 členů!!!!!!

---oooOooo---

DARY NA EDIČNÍ FOND ČES (část 3): R. Podepřel - 22.-, Th.Kilián - 1.000.-, EK Gottwaldov - 50.-, L. Cibur - 50.-, EK Písek - 150.-, ing.J. Kochman - 82.-, arch.J. Drlík - 700.-, R. Tomizcek - 100.-, J. Pomykacz - 50.-, Gajdzica G. - 50.-, K. Kubiczek - 150.-, A. Milatová - 50.-, H. Mendrok-50.-, P. Kohutek - 50.-, G. Niemczyk - 50.-, K. Mikeska - 10.-, J. Šulc - 12.-, EK Havířov - 225.-, J. Králová - 32.-, B. Grym - 32.-, O. Hrubý - 100.-, K. Čurda - 12.-, ing. P. Porobek - 42.-, ing.L. Fritsch - 22.-, K. Švarc - 16.-, I. Maroušková - 12.-, ing.M. Hrdličková - 42.-, JUNÁK Boskovice - 300.-, J. Kostka - 10.-, A. Kubová - 22.-, K. Zahradník - 42.-,(sa 9.634.-) Srdečně děkujeme za pochopení a v příštím čísle budeme pokračovat.

## Opravte si v Hromadově slovníku!

Využívám práva bývalého spolupracovníka na "Esperantsko-českém a česko-esperantském slovníku R. Hromady ( Praha 1961 ) a vyzývám jeho uživatele, aby si opravili ve slovníku tyto výrazy :

za termínem "mulĉo" škrtnout "kompost" a nahradit jej slovem "mulč" ; za výrazem "kompost" v česko - esp. části nahradit kmen "mulĉ" kmenem "kompoŝt" .

Činím tak na základě nových věcných a lexikálních poznatků. Mulčování (angl. mulching, rus. mulčirovanie, něm. Bodenabdeckung) znamená ochranné pokrývání půdy mezi rostlinami či kolem nich vrstvou slámy, sena, fóliemi z PVC atd. k zamezení vypařování vláhy ap. Mulč je ochranná nastýlka, pokrytí.

Výraz "kompoŝto" pro kompost je již používán (např. Heroldo de Esperanto , č.4/1956 nebo Esperanto-Englisch Dictionary J.C.Wellse, Londýn 1969, kde mulč = mulĉo, kompost = kompoŝto.

Jaroslav Mařík

Počínaje příštím číslem naše redakce hodlá zařazovat pravidelnou rubriku "Jazykový rádce". Ovšem za předpokladu, že do ní čtenáři zašlou své dotazy k vysvětlení různých gramatických jevů a nejasností. Odpovědi na ně naleznou v nejbližším čísle, kde se rovněž dozví, kdo je jejich autorem.

## Ricevitaj esperantaĵoj (januaro-marto ):

Interlingvistika Informa Servo, n-roj 4/1969, 1/1970 (kun interesega enhavo) — Esperanto Gazeto 10/1969 — Franca Esperantisto 11-12/1969, 1-2/ 1970 — New Digest 10/1969, eld. Junularo E. de Nordameriko — Bulteno de Usona Societo de E-instruistoj 9/1969 — Nové Domažlicko, semajna organo de ONV (skribas pri la laboro de esperantistoj ) — Intersteno 1/1970 — 883 radikvortoj Esperanto-italaj ( petu senpage ĉe d-ro Pastorello, 13 Fos sur Mer, Italio). — E-prospekto de Biblia muzeo de antikvaĵoj en Amsterdamo — Esperanta Heroldo, organo por E-movado en Slovenio, No 2/1970 — Universala Revuo 3/1970 — Oomoto 11-12/1969 — Bulteno de la aŭstria federacio esperantista fervojista 3/1970 — Lektoratoj de Esperanto, resuma trarigardo, eld. en Svedujo — Esperantisto Slovaka No 1/1970 — Bulteno de ISAE, 25.2.70

## UK SEN MANON LESCAUT ?

Kun granda bedaŭro ni sciigas, ke la ĉeĥa Ministerio de Kulturo decidis negative pri la partopreno de Silezia Teatro ĉe la 55-a UK en Vieno por prezenti tie teatraĵon de Vítězslav Nezval "Manon Lescaut."

## VERDA AGENTEJO RAPORTAS

• Cent dek neesperantistoj ĉeestis prelegon de s-ano Pavel Polnický, sekretario de ĈEA pri Finlando kaj Svedujo. Sukcesan aranĝon preparis Naturscienca rondeto ĉe Uzina klubo ROH Tesla en Pardubice (orienta Bohemio) kunlabore kun la loka ER. • Fervojista sekcio de ĈEA okazigis la 25-an de aprilo sian plenkunsidon en la stacidomo de Praha - Smíchov • Redaktoro de Čs. Radio en Praha, s-ro Dalibor Chalupa, iama kunlaboranto al "Verda Stacio", sendis dankleteron al ĈEA, rimarkigante, ke kvankam jam pensiita, li ne intencas rezigni pri la laboro por Esperanto.

Daŭrigo de la 6-a paĝo :

| | |
|---|---|
| Junulara kantareto de J.Cink... | 5 Kčs |
| (mendante 25 ekz.oni ric.rabaton | 10% |
| " 50 " | 20% |
| Neologismoj - vortareto | 1.- |
| Esperanto-Gazeto (10xjare) | 44.- |
| Juĝu mem - mallonge pri ĈSSR | 5,70- |

(havebla ĉe J.V.Otta, Šumperk, Nerudova 32 )

# Korespondi deziras

<u>Hungario</u> Kontakti letere kaj bildkarte ŝatus : s-ro TÓTH Béla, 29 jara profesoro, Mezőnagymihály, Ságváriu 3 ● s-ino NAGY Józsefné, 35 j. profesorino, Arnót, Petőfi u. 98 ● f-ino TAKÁCS Erzsébet, 26 j. profesorino, Nemesbikk, Dózsa György u 16 ● s-ino TÓTH Béláné, 32 j. profesorino, Mezőnagymihály, Ságvári u 3 ● s-ro KISS Ferenc, 22 j. edukisto, Boldogkőváralja, Kossuth u 63 ● s-ino KESZTHELYI Béláné, Pálháza, Dózsa György u 14 ● Ges-roj TÓTH Mihály, profesoro kaj administrantino, Hejőpapi, Jókai u 42 ● s-ino SZILÁGYI Dezsőné, Szikszó, Szabadság tér 8.

Ĵurnalistinoj - redaktorinoj de la plej granda hungara uzina ĵurnalo "Orion Ujság" dez. korespondi kun samfakaj esp. ĵurnalistoj, kiuj en sia uzina ĵurnalo gvidas E-rubrikon. Petata korespondado kun "Tesla" kaj aliaj fabrikoj : Éva BÁNHIDI, Budapeŝto X, Jászberényi u 29 kaj Éva BÁLINT, Orion Ujság, Szerkesztősége, Budapeŝto, P.O. 10, p.f. 84

<u>J a p a n i o</u> F-inoj HIGASI AKEMI, 17 j, Ooaza Isimaru 109-9, Hukuoka-si (libroj, manlaboro) ● TURUSAKI YUUKO, 17 j, Maekawa-tyo 2-tyome, Hokozaki, Hukuoka-si (libroj) ● TOMIOKA-TAKAKO, 17 j, Haruzumi-tyo 6-kumi 140, Hukuoka-si (gramofondiskoj kun pop. muziko, tabloteniso) ● NODA ORIE, 16 j, Tuya-honmati, 1-kumi, Tatara, Hukuoka-si (diskoj kun klasika muziko) ● TURUGA HUSAE, 16 j. Tani 2-tyome 8-12, Hukuoka-si (gramofondiskoj) ● TOYONAGA-NOBUYO, 16 j. Ooaza Katae 1431-14, Hukuoka-si (sporto, gramofondiskoj). Ĉiuj lernantinoj de gimnazio.

<u>B u l g a r i o</u> S-ano Ŝterjo KUKUŜEV, profesoro, str. Oboriŝte 15, Peŝtera, kun siaj 20 novaj esp. kursanoj atendas korespondadon kun ĉs. gesamideanoj kaj ankaŭ kun esperantistoj el aliaj landoj ● 38 novaj esperantistoj 14-17 jaraj dez. kor. kun samaĝuloj el ČSSR : Dinko ŜIŜKOV, p.k. 56, Părvomaj

<u>R u m a n i o</u> Interŝanĝi b.k., p.m., malnovajn monerojn kaj bankbiletojn, kor. kun junaj virinoj : Blaga LIVIU, Cornului 28, Sonicata Mare, Maramures.

<u>J u g o s l a v i o</u> Kun ĉs. esperantistoj Ranko GAVRANOVIĆ, 26 jara studento, Beograd, Bogdana Žerajića 36

<u>Estonia SSR</u> S-ino Hilja TULVE-LAANE, 55 jara flegistino, Viljandi str. Tartu 42a 1, kun iu ĉeĥino el Praha, pli maljuna, pri ĝardenkulturo, libroj.

<u>L i t o v i a</u> SSR Kun ĉs. amikoj f-ino Virga STAPULIONITE, Pasvalys, Torybu, 11-8

---

S-ano Kei K u r i s u petas ĉiujn siajn amikojn noti lian novan adreson: Mogusa Danti, 1-5-4 - 1004, Mogusa 999, Hino-si, Tokio-to, J a p a n u j o

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz, Praha 2, Blanická 4, aperas dumonate - vychází každý druhý měsíc, rediguje-redaktas Oldřich Knichal kun redakta komitato - s redakční radou: Ing. Eduard Felix, Jaroslav Mařík, Ing. František Sviták.